

Sarkasmoj de Miyamoto masao

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-831/305, 1979 septembro 13 kaj 15

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1979-46/SRI-1979-46-A-2-305-831-1979--09-13-15-Claude-kaj-Andree-Gacond-Sarkasmoj-de-Miyamoto-masao.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Ofte estas utile aŭskulti la sarkasmojn de kritikemaj homoj. Ili helpas nin rerigardi la mondon kun novaj okuloj. Tial la verko, kies titolo estas "Sarkasme kaj entuziasme eseis Miyamoto masao", eĉ se ĝi profunde ŝokos la legantojn, tute certe devigos multajn el ili revizii la proprajn vidpunktojn.

A.- Miyamoto masao vigle kontribuis, per sia impona verkaro, al la riĉigo de la esperanto-kulturo. Li multon tradukis el la japana, kaj, kiel skribas Vilmos Benczik en postparolo pri Miyamoto masao, "la unua nomo, kiu ŝovas sin en la memoron de ĉiu esperantisto, se li aŭdas pri Japanio, estas ĝuste tiu de Miyamoto masao." Sed li ankaŭ verkis originale prozo kaj poezie, multe recenzis kaj estas konata kiel talenta redaktoro.

Cl.- "Estas malfacile difini, sur kiu el la kvar terenoj lia kreaĵo estas la plej signifa en si mem." skribis Vilmos Benczik pri Miyamoto masao, kaj li daŭrigas: "Konsiderante la cirkonstancojn de la esperanta kulturo, mi emas kredi, ke liaj originalaj prozaj verkoj tamen havas prioritaton, kaj certe ne nur pro la ĝenerala mizera stato de la esperanta prozo. Lia elstara novelaro - se mi rajtas nomi ĝin entute novelaro - "Pri arto kaj morto" - krom sukceso ĉe la publiko kaj kritiko, atingis rekonon tian, kian atingas nur malmultaj esperantaj verkoj: ĝi aperis en portugala traduko far Manuel de Seabra."

A.- Al Miyamoto masao la esperanto-literaturo ŝuldas tiujn ĉi titolojn: Kanto de l' koro, Rakontoj de Oogai, La obstino, Japanaj malnovaj rakontoj, Japana Kvodlibeto, El japana literaturo, Kvin virinoj de amo, Pri arto kaj morto, Suito 67, El la vivo de Syunkin, Etudo 68, Kvinteto 69, Kaprico 70, El Manjoo, Invit' al Japanesko, Nokturno 71, Sonato 73, Utaaro de Takuboku, Naskitaj sur la ruino - Okinavo, El la japana moderna poezio, Japana Variacio.

Cl.- Tiu verkisto per siaj tradukoj el la japana kaj per sia poezio kaj prozo malfermis al ni fenestron al Azio. Li invitas nin klopodi enbraki ankaŭ Azion en niaj kulturaj interesoj. Kaj tiu ĉi invito havas profundan celon, internaciigi esperanton.

A.- Aŭdu kelkajn citaĵojn el la unua parto de Sarkasme kaj entuziasme eseis Miyamoto masao, kaj vi eble alvenos al la ideo, ke tiu japana esperanto-verkisto ne malpravas:

Cl.- "Esperanto estas nur eŭropa lingvo tute ignoranta kulturojn de Azio kaj Afriko. Lastatempe pli kaj pli profundiĝas kaj enradikiĝas tia kredo ankaŭ en mia koro. Se tia stato daŭros, nia lingvo finfine restos nur komuna por eŭropanoj, sed fremda al azianoj kaj afrikanoj.

A.- Alia citaĵo: "Se nia lingvo deziras esti internacia jam forĵetinte sian krizalidan ŝelon, kiel iuj pretendas, ke ĝi jam ne estu nomata internacia helplingvo, kaj se okcidentanoj vere deziras starigi internacian reciprokan komprenon, ilia unua devo devas esti klopodi por kompreni, sciiĝi aŭ koni, ke la mondo konsistas ne nur el Eŭropo kaj Amerikoj.

Cl.- Tria citaĵo, kiu bone karakterizas la sintenon de Miyamoto masao: "Esperanto estas nun laŭ la karaktero nur eŭropa lingvo, tamen ĝi celas esti internacia, kaj ankau mi, ne kiel nuresperantisto, sed kiel adepto de la interlingva ideo, klopodas por ĝi, ĉar kiel ajn ni opinias, nun ne troviĝas alia rimedo por ebleco de la interlingvo, krom tiu vojo de Esperanto. Sed tamen precipe kiam mi konsideras la nunan staton de niaj internaciaj organizoj, en mi ĉiam ĝermas tia ideo, ia suspekto aŭ espero, ke iam naskiĝos alia, eble pli azieca afrikeca lingvo ol la nuna Esperanto, kvankam ĝi ne povos tute ignori la nunan... Jes, nur kun tia ideo mi laboras por la lingvo." (fino de la citaĵo).

A.- Miyamoto masao opinias, ke ne nur kultura malfermiĝo al Azio estas necesa al esperanto, sed ankaŭ gramatika revizio de niaj vidpunktoj restintaj eŭropocentraj. Ni ree citu lin:

Cl.- "Por glatigi la vojon por la estonta vera (ne inter-eŭropana) lingvo, nun mi volas proponi, ke niaj gramatikistoj ĉesu tro cerbumi sur la bazo de la eŭropaj lingvoj, kaj kiel eble plej simpligu la lingvon. Unue ni forĵetu tian cerbumindaĵon - balaston: la artikolo antaŭ la propraj nomoj. Sufiĉas por ni simple: Nigra Maro, Ruĝa Maro ktp. Ĉar "por ke lingvo estu tutmonda, ne sufiĉas nomi ĝin tia", kaj tia uzo de la artikolo efektive donas al ni nenion, krom al plia eŭropigo de la lingvo kaj malfacilon al azianoj." Fino de la citaĵo.

A.- Tute certe Miyamoto masao ne predikas plu en la dezerto. Ankaŭ Claude Piron, kiu verkas sub la plumnomo Johán Valano, komencis atentigi nin, ke esperanto ne devas resti eŭropa lingvo.

Cl.- La sarkasmoj de Miyamoto masao antaŭ ĉio verŝiĝas en liaj recenzoj. Kaj tuta serio de tiuj mallongaj kaj ofte trafaj tekstoj aperis en "Sarkasme kaj entuziasme eseis Miyamoto masao". Persone ni legis tiun ĉi parton de la libro kun multe da intereso. Kaj mi pensas vin interesi la venontan semajnon, legante al vi erojn el tiuj ĉi kritikoj, kiuj estas meditigaj.

A.- Kiel vi konstatos, Miyamoto masao ne estas tre milda en sia juĝo pri la ĝisnuna nivelo de la esperanto-literaturo. Dum la lastaj minutoj, kiuj hodiaŭ restas al ni, jen refoje ni citu lin:

Cl.- "Aĉetu! Aĉetu! se eĉ sen lego, via aĉeto mem estas granda kontribuo al la movado! Mi estas certa, ke nia redakcio invitis min, ne por ke mi diru nur tiel. Do... Por ne aĉeti (kaj ne legi) oni havas multajn pretekstojn kaj same multajn pravajn kialojn, kaj unu el ili, laŭ mia opinio, troviĝas en tio, ke nia literaturo precipe originala, ankoraŭ staras sur nealta nivelo, se ne diri malalta, kaj ne estas komparebla kun naciaj. Kontesti estas facile, tamen la realo... Ni devas peni kaj peni, sed kiel?"

A.- Homo, kiu tiom penis, por kulture kontribui al la riĉigo de la esperanto-literaturo, rajtas esti severa, eĉ foje amara. Sed Miyamoto masao tamen restas entuziasma kaj kapablas entuziasmigi nin. Jen la sekreto de lia pozitiva influo.

Cl.- Vi aŭdis prelegon de Svisa Radio Internacia. Prelegis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!